

Thomas Moore,
La lasta rozo

*tradukita de Clarence
Bicknell*

Jen la lasta rozeto de fora
somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam
velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne unu
rozflor'
Partoprenas komplete en
ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tut-
sola, ho roz'.
Iru dormi kun ili en paca
ripoz'.
Nun viajn petalojn
disĵetas mi for
Al viaj kunuloj sen viv',
sen odor'.

Tiel same volonte formor-
tus mi mem,
Se ne plu min atendus
amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi
mond'
Volus loĝi izola sen amo-
respond'?

...

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo
de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte
kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-
burgono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la so-
pirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene
sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru,
dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur
bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma, malviva ku-
nular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' ami-
keco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos
lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj, sente-
maj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en
malvarma mondo?

...

Thomas Moore,
La lasta rozo de so-
mero

tradukita de N. N. 101

Nun floras de l'somero la sola
lasta rozo.
La kunvivantoj ĝiaj velkis en
mortripoz:
ne estas flor' parenca, aŭ roz-
burgono ia,
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redo-
ni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la
tronket' plendeti
Ĉar la beluloj dormas, vi devas
kundormeti.
En morto, sen parfumo,
l'amikoj jam dormetas:
Do floron vian teren ĝentile mi
disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec'
finiĝus
Aŭ la juveloj brilaj de
l'amular' foriĝus:
Ĉar se la koroj veraj kaj dolĉaj
ne plu estus,
En la dezerta mondo volonte
kiu restus?

...

Traduko de la Angla poemo “*T is the Last Rose of Summer*” de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (*1842-10-27 – †1918-07-17).

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell_C._Bordigheza.

Traduko de la Angla poemo “*T is the Last Rose of Summer*” de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).

Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.

Traduko de la Angla poemo “*T is the Last Rose of Summer*” de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.

Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.